parolinton en tiu ĉi nomita kunveno kaj instiginton de tiu ĉi verketo, kaj ankaŭ nian karan Prezidanton de la ligo N. K., Sron Damen.

La ĉie konata Frato Bartolomeo faris belegan prelegon kaj vidigis al ni teruran staton, per helpo de lumbildoj, pri la estinta kaj nuntempa Rusujo. Li rakontis pri Lenin, Trotzki kaj helpantoj. Pri la mizera mortigo de la cara familio, pri la vivo antaŭ, dum kaj post la milito en Rusujo. Li montrigis kelkajn generalojn, kiuj pruvis haltigi la abomenaĵojn de la tiamaj gvidantoj pri morto kaj sufero, sed ne povis sukcesi. Li memorigis, kiamaniere sennombraj personoj el diversaj rangoj estis kruele turmentitaj diversmaniere, senkapigitaj, forbruligitaj, dronigitaj. Li tremegis nin, kiam li aŭdigis, ke oni elpikis la okulojn, detranĉis nazojn kaj orelojn, mortpafis, sufiĉe, ke oni faris ĉiajn teruraĵojn, kiajn ajn oni povas elpensi.

Sed nun venis la parolado de Sro. Möller kaj kion li priparolis estu konata trans la tuta mondo!

Komence li diris enkondukantajn vortojn pri nia kara lingvo kaj instigis la ĉeestantojn por fariĝi anoj. Poste li deklaris, ke estis tiel strange, ke ni Katolikoj kun organizo de proksimume (300000000) tricent milionoj da anoj, tiel malfavore staris, kontraŭe de nia lingvo. Strange, li diris, eĉ treege.

Post deklaro ke Esperanto estis, estas kaj estos la lingvo, kiu povis, povas, kaj povos transpasi la barilojn de ĉiuj landlimoj, kunigi ĉiujn homojn sur la tero, tial li ne povis kompreni, ke ni kun tia amasego da anoj, denove venis malantaŭen, kiel la plej malgranda organizo esperantista. Li mirigis nin, ke estis en Rusujo tiom da agemaj personoj, asocioj, k. t. p., kiuj jam uzas Esperanton por disvastigi siajn ideojn, kaj kiajn? Li plue rakontis, ke esperanto estas Didonaco, kaj komparis, kiam Dio dum Pentekosto al la apostoloj faris kapablon supernaturan por paroli, por ke ĉiu povu kompreni unu la alian. Al tiu ĉi li aldonis, kiam Dio donas naturan donacon, tiam Li ne bezonas fari supernaturon. Tial ni devas kapti la okazon, por la disvastigo de nia Kredo, por ne esti venkataj de aliaj kredanoj aŭ ĉefe nekredanoj.

En tiu ĉi kriza epoko trans la tuta mondo estos necesege, ke ni Katolikoj amase kunvenu aŭ interrilatu letere, per helpo de nia kara lingvo. Ke ni estu flanke de nia grandioza kredorganizo, la plej granda organizo esperantista, kiu uzas Esperanton, kiel la duan lingvon. Ekzemple: por privigle povi disvastigi la ordonojn de nia Papo, la ĉefo sur la tero de nia Kredo. Tiam ne plu estos bezonate, antaŭtraduko de la parolotaj aŭ skribotaj vortoj aŭ ordonoj.

Tial varbu, varbu senĉese, varbu senripoze novajn anojn. Kunigu vin en ligoj, precipe landligoj.

Instigu viajn paroĥestrojn pritrakti esperantajn temojn eĉ en la pregejo, por ke ni estu la plej granda organizo, kiu povos ekzisti pro la gloro de Dio kaj nia Kredo.

M. T. Aerdts

★

TRI MONATOJN EN VOJAĜO

(Daŭrigo)

KIEN...?

Alvenis la tempo forvojaĝi el Belgujo. Mia intenco estis iri en Germanujon. La landlimo estis jam proksima. La ekspresvagonaro, plenplena de germanoj kaj-inoj, kiuj rapidege forlasis la somerrestadejon en Oostende por reveni en sian landon, minacatan de financa bankroto. 14-an de julio...! La ĵurnaloj publikigas la rifuzon de Usono helpi Germanujon. Nigraj nuboj ŝvebas en la ĉielo de la germana lando... Mi ricevas la konsilon rezigni, almenaŭ momente, la eniron en Germanujon. Kaj mi akceptas tiun ĉi saĝan konsilon.

Sed kien iri...? Mi rapide studas la fervojplanon. Solvo troviĝas baldaŭ: reveni ĝis Pepinster kaj tra Spa kaj Luxemburgo iri en Svisujon. El tiu ĉi lando, vera koro de Eŭropo, mi facile povos vojaĝi en Aŭstrujon kaj daŭrigi mian vojon.

FILOZOFADO

Absolute sola en la kupeo ĝis Luxemburgo, dum kelkaj horoj mi povis senbride vagigi miajn pensojn en profunda meditado.

La vagonaro iradis tra belegaj pentrindaj valoj de la montoj Ardennes, tiel ofte menciitaj en la stabbultenoj dum la terura granda milito, de kiu la nuna ekonomia krizo suferiganta Eŭropon, estas nur konsekvenco. Mi trapasis Spa'n. Tie loĝis la Germana Imperiestro dum parto de la milito. Tie li rezignis... el tie li iris en la ekzilon... «Nia Dekunua», okazinta en la bela banurbo Spa, ankaŭ revenas en mian memoron. Kaj precize mi ne povis ĝin viziti pro la grandega financa krizo, kiu tiutempe—komence de aŭgusto 1926-a—travivis Francujo. Ĉiutage falado en la kurzo de la franca franko. Mi, trapasonte la tutan Francujon por iri al Spa, nevole devis rezigni mian aliron... Nun io simila devigas min rezigni la trapason de Germanujo.

La Homara solidareco ne estas vana eldiraĵo, sed profunde elpensinda vero.

ĈU PANEŬROPO...?

Dume la vagonaro marŝadis rapide. Mi rimarkas, laŭ la nomoj de la stacidomoj ke mi ne plu estas en Belgujo. Jen nova lando, kie mi antaŭe neniam estis: Luxemburgo. Baldaŭ la vagonaro haltas: mi alvenis jam en la samnoma ĉefurbo de la malgranda ŝtato.

Nur tiam mi konscias pri io eksterordinara: la unuan fojon mi trapasis landlimon kaj oni ne venis revizii miajn pakaĵojn nek la policanoj postulis la elmontron de la pasporto. Ĉu escepto? ĉu regula agado? Mi nescias: mi nur konstatas la fakton. Devigata interrilati dum mia tuta vojaĝo nenombreblajn fojojn kun doganistoj kaj policanoj, mi rememoras ĉiam plezure la enirон en Luxemburgon, kie la landlimaj formalaĵoj ne ĝenis min.

Jen ideala procedo por ĉiuj ŝtatoj. Jen la belega ŝonĝo de Paneŭropo ekrealigita. Sed por ĝin atingi estas necese, ke tra la Eŭropajn ŝtatojn blovu aeroj de vera paco, kiu ne estas nur la malo de milito, sed—laŭ vortoj de la Papo—ĝi estas «la orda trankvileco».

Post kelkhora restado en la bela landeto, kie armonie kunvivas du rasoj, mi daŭrigis la vojaĝon.

Nokte. Pluvas. Mi trapasis dormetante la belegajn kampojn de Alsaco, jam alian fojon de mi vizititajn. Malgraŭ ke estas nokte kaj pluvas, oni vidas ĉie festajn flagojn kaj ornamojn... ĝojon sur la vizaĝoj; oni aŭdas gajajn muzikistarojn, ridojn... Estas la franca nacia festo!!—Nevole mi komencas inter dormetoj denove filozofadi. Sed... baldaŭ mi estas en

SVISUJO,

kaj tie novaj ideoj kaj novaj planoj ĉesigis la filozofadon.

Kiel dirite, mia restado en Svisujo estis nur por prepari la viziton en Aŭstrujo kaj Hungarujo kaj de ĉi tie al Polujo. Mi restis, do, en la lando svisa nur la precizan tempon por skribi kelkajn leterojn kaj atendi la respondon. Sed mi havis okazon por iomete prilabori la aferon de nia Movado kaj mi profitis ĝin.

En Oerlikon—bela kvartalo de la urbo Zürich, kie mi trovis afablan gastigon ĉe familio Haesele—okazis festo en la katolika preĝejo. La predikanto en tiu festo estis Lia Ekcelenca Moŝto, D-ro Scheiwiler, Episkopo de St. Galien. La paroĥestro afable min prezentis al Lia Moŝto, kun kiu mi povis interparoli kaj de kies buŝo mi aŭdis enkuraĝigajn vortojn por nia Movado.

Ankaŭ mi vizitis en St. Gallen la fervoran kunlaboranton, S-ron Finkel. Tre juna li estas, sed lia fervoro estas tiom granda, kiom lia juneco. Ni longe babilis, kaj el tiu vizito mi eliris ankoraŭ pli firme konvinkiĝinta pri la nepra neceso varbi multajn, multegajn gejunulojn por nia organizaĵo.

Nur kiam granda aro da gejunuloj kunlaboros ĉiulaude, ni povos trankvile rigardi la estonton.

SURVOJE AL WIEN

De St. Gallen mi iris al Bruchs, por tie preni la ekspresvagonaron Paris-Wien. Longa atendo en tiu landlima stacidomo. Antaŭ mi bela montaro kaj en ĝi kuŝas la bela princlando Liechstenstein, la malgranda ŝtato, kiu tiom favoras la disvastigon de Esperanto pere de siaj poŝtaj eldonaĵoj. Bedaŭrinde mi ne havas sufiĉe de tempo por fari eĉ rapidan ekskurson al la bela lando. Baldaŭ alvenis la vagonaro. Mi supreniras la unuan vagonon antaŭ mi. Plenplena de vojaĝantoj: eĉ la koridoro estas okupata. Tuj frapas miajn okulojn inter la homamaso junulo kun verda stelo kaj alia insigno de mi bone konata: aglo. En unu momento mi scias, ke li estas esperantisto per la verda stelo kaj katolika ĉeĥo pere de la aglo, ĉar ĝi estas insigno de la katolikaj gimnastikistoj en Ceĥoslovakujo.

Aŭdinte mian nomon li tuj min helpas. Ni kune serĉas bonan lokon por mi en alia vagono kaj ni tion trovas. Komforta kupeo ne tro plena, kie dum la veturado mi ofte ricevis lian viziton. Mi aŭdas, ke kvankam li estas ĉeĥo, Wien estas lia kutima loĝejo kaj tie li gvidas esperantan grupon inter *Orel*-anoj. Kaj li informas min pri multaj konfidenciaj aferoj de nia movado en Wien. Ne vane li estas detektivo!!

Je la 11-a nokte mi alvenas en la Okcidentan Stacidomon de la aŭstra ĉefurbo. Atendas min gesinjoroj Chiba, ĉiam afablaj kaj bonkoraj, kiuj volonte akompanas min ĉe ilin, kie mi trovis konfortan gastigon. La gesinjoroj demandas pri mia sano, pri la vojaĝo, pri niaj komunaj gekonatuloj... Kaj la demandoj ankoraŭ daŭrus se mi, laca, ne devus enlitiĝi.

LA INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO

Mia unua vizito en Wien estis por tiu ĉi Muzeo, vere admirinda entrepreno. Diversfoje mi estis leginta en la Esp.-gazetaro pri la Muzeo kaj mi vere emis koni ĝin. Verdire mi jam ĝin vizitis antaŭan fojon: tuj post la inaŭguro, kiam ĝi ne okupis ankoraŭ sian definitivan loĝejon. Nun ĝi estas en propra ejo, en la «Neue Burg» (Nova Palaco), en bela ĉambro, bele aranĝita. Kaj la tuta esperantistaro, senescepte, devus fieri pro tiu ĉi Muzeo, kiu meritas —kaj eĉ rajtas—ĉies atenton kaj subtenon.

INTERNACIA ESPERANTO MUZEO EN WIEN
(LA ĈAMBREGO, EJO DE LA MUZEO, MONTRITA PER KRUCO)

La Internacia Esperanto-Muzeo havas animon. Ĝia animo estas la iniciatinto, fondinto kaj nuna Direktoro, S-ro. Reg. Kons. Hugo Steiner. Lia aktiveco devus esti konata kaj subtenata de ĉiuj esperantistoj, ĉar li ja estas unu el la plej fervoraj, neniam lacaj, propagandistoj. Mia unua vizito en Wien, kiel jam dirite, estis por la Muzeo; mi ne devas penti pro tiu ĉi unua paŝo, sed tute male. Ĉar kiam S-ro. Steiner vidis min kaj aŭdis mian nomon li tuj fervore ekagis por sukcesigi mian viziton en Wien. Kaj ĝi sukcesis! Li opiniis, ke granda propagando estus Radio-parolado. Do, al la laboro por ĝin atingi.

INTERVJUO ANTAŬ LA MIKROFONO

Tio estis lia unua sukceso; interesigi la Direktoraron de la «Ravag» (Radio Wien) profitigi mian trapason por paroligi min antaŭ la mikrofono. Mi mem persone ĉeestis kaj scias kiom S-ro Steiner devis klopodi por tion atingi. Nova malfacilaĵo estis trovi tempon en la programo por enŝovi mian paroladon. Sed S-ro Steiner sciis konvinki ĉiujn kaj fine estis decidite, ke la sekvantan tagon—24 de julio 1931-a—je la 19.15 horo, okazos intervjuon antaŭ la mikrofono inter S-ro Steiner kaj mi, kun germanlingva traduko de S-ro Smital.-Ĉar devis okazi ŝanĝon en la programo, la laŭtparolisto de la Radio-stacio trifoje anoncis la intervjuon kiel ankaŭ tion faris en la Radio-fako ĉiuj ĵurnaloj en Wien.

La teksto de la intervjuo estis poste publikigita en «Aŭstria Esperantisto» kaj «Heroldo». Ĉar mi kredas, ke ankaŭ vi, kara leganto, ŝatos ĝin legi, mi ĉi tie ĝin enpresigas, korektinte kelkajn erarojn negravajn, kiujn en la teksto de «Aŭstria Esperantisto» mi trovis:

«**Steiner:** Mi elkore vin salutas, s-ro prezidanto, kaj esprimas mian ĝojon, ke via unua vojo en Wien kondukis al Int. Esperanto-Muzeo.

Font Giralt: Estis nur mia devo, viziti nian muzeon, kiu estas tiom grava por la esperantistoj en la tuta mondo, kvazaŭ ilia Mekka, kiel diris via respublika prezidanto.

St.: Kial vi venis al Wien?

Gi.: Travojaĝante al la Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo mi ne volis preterlasi, viziti la Wien-ajn membrojn de IKUE.

St.: Kiel statas via movado, s-ro prezidanto?

Gi.: Mi dankas, kontentige. Ni restarigas en la tutmondo malnovajn grupojn, novaj ekestas. Ekzemple la nederlandanoj solaj nombras pli ol 1000 en sia ligo. En lasta tempo ni speciale atingis tre valoran apogon de kelkaj episkopoj.

St.: Ĉu vi permesas demandi de kiuj?

Gi.: Oh, kial ne. Estas la episkopaj moŝtoj Scheiwiler de St. Gallen en Svislando, Curi en Bari (Italujo), Domenico en Chelm (Polujo). Cetere ja ankaŭ via kardinala moŝto d-ro Piffl sin esprimis tre favore pri Esperanto.

St.: Kiam vi havis okazon, paroli kun ilia eminenca moŝto?

Gi.: Mi havis la honoron, konatiĝi kun li la pasintan jaron en Budapeŝto ĉe nia katolika Esperanto-Kongreso.

St.: Tie vi certe ja ankaŭ parolis kun aliaj eminentuloj pri Esp.?

Gi.: Jes, ne nur li sed ankaŭ la papa legato ĉe Emeriko-festo, la hungara princprimato Seredy, eksĉefministro Huszar k. a. sin montris favoraj al niaj klopodoj.

St.: Ĉu vi jam scias, kie okazos via venonta kongreso?

Gi.: Ekzistas propono okazigi ĝin aŭ antaŭ aŭ post la Universala de Parizo en Lisieux aŭ Lourdes.

St.: Niajn aŭskultantojn certe interesos, en kiuj interrilatoj via Unio estas kun la ĝenerala Esperanto-movado.

Gi.: Nia agado celas ja utiligi la internacian helplingvon por katolikaj interesoj. Sed, se pruvo por bonaj interrilatoj estas necesa, oni tian certe povas konsideri, ke mi estas aparte invitita en mia prezidanta rolo al la Universala Kongreso de la Direktoro de Universala Esperanto-Asocio. Ankaŭ la jarlibro de UEA pruvas, ke multaj niaj membroj estas delegitoj de tiu grava tutmonda organizaĵo.

St.: Ĉu la reĝimŝanĝo en Hispanujo malutilis la Esp.-movadon tie?

Gi.: Mi devas aserti la malon. Antaŭe ekzistis sub la diktatoreco malhelpoj, oni eĉ emis kelkloke persekuti esperantistojn ĉar ili ankaŭ uzis la internacian lingvon por naciaj celoj, kiel ekzemple ni katalunoj. Ni uzis ankaŭ E.-on por konatigi al tutmondo nian antologion. Tre grava verko, kiu en sia unua eldono jam elĉerpiĝis kaj nun devis esti eldonata en dua eldono en 1000 ekzempleroj.—Ĉu vi memoras la eksplodon de la hispana ribelo en Jaca (elp. Ĥaka)? Tiam la konata E.-pioniro kolonelo Mangada estis komandanto de la trupoj tie

kaj oni arestis lin, ĉar li demokrate vizitis la arestitojn.

St.: Oh jes, li skribis ankaŭ al mi karton el la malliberejo.

St.: Vi, s-ro prez., venas el la lando de la Floraj Ludoj. Ĉu vi ne bonvolus klarigi al ni ties esencon?

Gi.: Volonte. Antikva kutimo el la 13-a jarcento ĝis nun estas kulturata en Katalunujo. Tiam la provencanaj trubaduroj en belaj poemoj prikantis siajn amatinojn. Kaj ĝen la unua semajno de majo okazis konkurso. La venkinto ricevis «naturan floron», kiun li publike donacis al sia amatino, kiu tiel fariĝis «Reĝino de Floraj Ludoj». Ĉi tiu antikva kutimo jam de jaroj estas kulturata ankaŭ pere de la esperantistoj kaj mi mem prezidis la lastajn «Florajn Ludojn».

St.: Tre interese. Nun bonvolu diri al mi, de kiam vi estas esperantisto?

Gi.: Kiam okazis en septembro 1909 la Kvina Universala en Barcelona mi estis naŭjara knabo. Mia patro lernigis al mi la lingvon iomete antaŭ la Kongreso. Ĉiam kun fiero mi memoros la momenton, kiam mi salutis la Majstron Zamenhof.

St.: S-ro profesoro, vi vidis multajn urbojn jan okaze de viaj vojaĝoj. Ĉu vi jam antaŭe ankaŭ estis en Wien?

Gi.: Jam antaŭ du jaroj mi trapasis ĝin veturante al Praha.

St.: Ĉu vi rimarkis diferencon inter tiam kaj nun?

Gi.: Nu sincere dirate: Antaŭ du jaroj via urbo, ŝatata en tutmondo kiel centro de antikva kulturo kun siaj belegaj palacoj kaj muzeoj, kun sia raviga ĉirkaŭaĵo, ŝajnis al mi iom senviva. Sed nun multa vivo regas sur la stratoj.

St.: Tiun viglan frekventon kaŭzas la multnombra gastaro ĉe Dua Laborista Olimpiado, inter kiu troviĝas ankaŭ multaj esperantistoj. Sed nia lando multe suferas pro la ekonomiaj cirkonstancoj.

Gi.: Despli mi ĝojas, ke Vienno, la Parizo de Mezeŭropo, malgraŭ la suferoj je la krizo tuteŭropa neniom perdis de sia sereniga ĉarmo al fremdulo.

St.: Nu, s-ro prez., mi tre dankas pro viaj rekonemaj vortoj pri Wien kaj havas nur unu peton je la fino: Ne forgesu nin hejmenveninte kaj speciale ne forgesu IEMW!

Gi.: Estu konvinkita, s-ro Steiner, ke mi ne nur zorgos havigi al la Muzeo la

ANTAŬ LA MIKROFONO DE RADIO WIEN. (24-VIII-31)

kompletan katolikan Esperanto-materialon, sed uzos ankaŭ nian modestan influon por anigi niajn membrojn en tutmondo al IEMW.

St.: Koran dankon!

Gi.: Koran dankon s-roj Steiner kaj Smital.

J. FONT GIRALT

(Daŭrigota)

Kunlaboru! Memoru ke la nuna eldonado de E. K. estas entreprenita pro fido al ĉies kaj ĉiuspeca kunlaboro.